# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:35; septembro 20.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen. Sume 300 KB

## Kursoj en Burundo

Hodiaŭ mi gvidis mian unuan fizikan esperantan klason en mia klubo nomata 'Paca Armeo' post la 109-a UK. Kiel estrarano de ILEI, mi devas montri bonan ekzemplon. Ni estas vokataj fari ion por la progreso de nia kara interamikiga Esperanto en Afriko.

Instruisto: Aime Patrick Manirakiza. Buĵumburo




## Premio Maertens aljuĝota

La sekretario de la Premio Maertens atentigas ĉiujn, ke la 30-a de septembro estas limdato por proponi kandidatojn por la premio Maertens. La proponojn oni sendu al la retadreso: sekretario.premio.maertens@gmail.com.

Bonvolu legi la regularon antaŭ ol fari proponojn:

https://uea.org/teko/regularoj/regularo_fondajho_maertens

Michela Lipari

## Universitata kunpensado

Ni aŭskultis raporton de Probal Dasgupta kaj Sajal Dey pri la instruado de Esperanto en prestiĝa nord-barata uiversitato. Krom tio ni aŭdis pri la sukceso de la kunveno pri konstruitaj lingvoj en Francio de Philippe Planchon kaj pri la ekzameno kaj diplomoj al la kursanoj de la universitato en Teherano

Telegramstile raportis Renato Corsetti.

## Hungara triopo en la itala kongreso




Fakte entute estas kvaropo, la kvara estas Monika Molnar – ĉiuj kvar la studentoj kaj disĉiploj de la karmemora d-ro István Szerdahelyi.

## Printempa reta kurso sukcese finiĝis

Krom UK 2025 en Brno, ĈEA esploris printempe alian novan kampon - instruadon de Esperanto per Interreto. Danke al la komuna laboro precipe de Milan Kolka, de la pedagogia sekcio (Miroslav Malovec, Mirka Tomečková, Jana Melichárková), de Josef Kalčík kaj de Pavla Dvořáková oni sukcesis prepari kurson gvidotan de Milan Kolka kaj certigi sciigon pri ĝi uzante *Facebook* kaj retejon. El la maksimuma nombro de dek partoprenantoj, ses finis la tutan kurson (11 interretaj kunvenoj de aprilo ĝis junio) ĝis la fino. Ni gratulas al ili ĉiuj kaj ni deziras al ili daŭran sukceson!

## Balkane, plu elane, Danube sendube

En la lasta reta kunveno partoiprenis esperantistoj en Albanio, Bosnio, Hungario, Italio/Britio, Rumanio kaj Serbio. Oni diskutis pri la kongreso en Beogrado en aŭgusto 2025, kies organizado progresas regule. Interalie estis kontaktoj kun la Ministerio pri Edukado, kiu promesis ĉeesti la inaŭguron kaj prelegi en ĝi. Diskutataj estis ankaŭ la situacio de Esperanto en Bosnio, la propono pri la organizado de la panonaj tagoj en postaj jaroj. **SMG:** Pannonia estis la nomo donita de la romianoj por la teritorio de Hungario kaj najbaraj regionoj.

Gvidis la kunvenon Radojica Petroviĉ. Protokolis Renato Corsetti

## Facile pri Aruŝo

https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/aru%C5%9Do-gastigis-memorindan-universalan-kongreson-r444/

## Superaj ekzamenoj novembre – jam nun pretigu vin!

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

Informoj pri la novembraj C2-retaj KER-ekzamenoj de UEA. Klarigo, datoj, senpagaj provtestoj, trejnadoj kaj la aliĝilo .... ĉio necesa. Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=908

## Nun ankaŭ la norda Barato aktivas

Jen raporto pri la instruado de Esperanto en EFLU kaj la Universitato de Jadavpuro, Kolkato. 'Pasintjare mi instruis du mallongajn kursojn de Esperanto al malgrandaj grupoj da studentoj en mia universitato. En unu grupo estis ok gestudentoj, en la alia estis nur ses. Tiu estis dumonata kurso de elementa Esperanto, sed la kurso ne estis oficiale agnoskita de la universitato'.

Aŭguste ni komencis gvidi retan enkondukan kurson sub la egido de la lingvistika fako de la Universitato de Jadavpuro, la plej fama universitato de la orienta parto de Barato. Ĉi tiu estas sesmonata kurso de elementa Esperanto. Du instruistinoj: Arundhati Das kaj Nivedita Jana, ĉefe instruas tie. Prof. Probal Dasgupto kaj mi helpas ilin pri la planado. Nun ni havas pli ol kvindek gestudentojn en la grupo, ili ĉeestas du unuhoran lecionojn semajne.  Ĉi tiu kurso estas oficiale agnoskita de la lingvistika fako de la Universitato de Jadavpuro, kaj partoprenantoj ricevos diplomojn.

Sajal Day

## Syam Sunder Pal

Okaze de la naskiĝtago de mia regiona Eo-pioniro Syam Sundar Pal. Mi reafiŝas la vortojn ĉi tie  por ŝtopi la breĉon dum ni atendas la raportojn de la efektivaj instruantoj de la kurso, Devarati Jana kaj Arundhati Das, kiuj pli ol plentempe laboras kaj tial nur post kelkaj tagoj, konsiliĝe kun Sajal kaj mi, povos liveri siajn raportojn; nur post ili mi elpaŝos ĉi tie kun miaj propraj vortoj suplementaj. Dume, legu jenon, mi petas:

<<Mi deziras al samideano Syam Sundar Pal belan celebron. en nia landparto (do En la orientbarata ŝtato Okcidenta Bengallando) eniras fazon de serioza kresko kvalita kaj kvanta. Ĵus komenciĝis senpaga reta kurso por bengallingvanoj sub la egido de la fakultataro de lingvoj kaj lingvistiko  de la prestiĝa universitato Jadavpur. La fakultataro kunagas kun la prilingve aktiva neregistara organizaĵo Tritiyo Parisar (tria spaco), per kies retejo la kurso funkcias. Samideano Pal estis inter la prelegantoj kies kontribuojn Tritiyo Parisar prezentis kiel unusemajnan seminarion antaŭ du jaroj por klarigi al la publiko kio estas Esperanto, kion celas la kurso, kaj kian vojon sekvis la movado en Barato. Mi dankas samideanon Pal ne nur pro tiu lia specifa kontribuo, sed ankaŭ pro lia senlaca agado kiel pionira aktivulo por la internacia lingvo en Okcidenta Bengallando.>>

Probal Daŝgupta

## Pli da kursoj – france, barate

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: AŬTUNAS, la Esperanto-ferioj kaj *Interkant*
Gvidantonomo: Renée Triolle; Aldoninto: Bert Schumann

Tipo: Nova movada kurso
Loko: Baugé en Anjou, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27654

Nomo: Jadavpur University
Gvidantonomo: Arundhati Das kaj Devarati Jana. Aldoninto: Probal
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Kolkato, Barato (Hinda Unio)

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27655

## Paco kaj ni

Ni esperantistoj scias, ke la demando pri paco dependas ankaŭ de la lingva situacio – ja **Zamenhof** mem elpensis nian Lingvon ĝuste por interpacigi la malsamajn etnojn en sia urbo. Sed kion scias la neesperantistoj? Ne hazarde, ĉi-jare UN/UEA kaj la Konsilio de Eŭropo elektis similan temon por siaj Tagoj, nome: por la **Internacia Tago de Paco** (21-a de septembro) **UN** elektis temon *Kultivado de kulturo e paco*, kiun **UEA** plilarĝigis al *Kultivado de kulturo de paco, per lingvoj por la paco*"; dum la **Konsilio de Eŭropo** elektis temon *Lingvoj por Paco* por la **Eŭropa Tago de Lingvoj** (26-a de septembro).

**Eŭropa Esperanto-Unio** decidis kunigi la du datojn en la **Semajno de Lingvoj kaj Paco**, por kies diskonigo ĝi liveris afiŝon kaj deklaron al la Landaj Asocioj de Eŭropo. Per la liglo vi povos elŝuti la esperantlingvajn afiŝon kaj deklaron: afiŝo – deklaro.

d-ro **Luigi Fraccaroli** luigi.fraccaroli@esperanto.it (bildoj sept 8

========= vortoj: 1010 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.